


# LA VERDA LUPEO

24-a Jaro



10(89) INFORMILO DE ELF-AREK Junio 1992

Offizielles Organ der ArGe ESPERANTO im BdPh e.V.




1928 Göteborg







1929 Leipzig

## Glumarkoj de la SAT-Kongresoj EL LA JAROJ 1928-1938

1933 Stokholmo

LA KLUBO ESPERANTISTA DE TRAMISTARO
GÖTEBORG
SVEDIO

ESPERANTO
XIII:a KONGRESO DE SAT.
STOKHOLMO, SVEDIO.
5-10 Aŭg 1933.

SVERIGE 5 öre

Sendinto:
A. Filipsson
Brahegatan 18 B III
Göteborg
Svedio Sverige
Schweden

Al S-ano,
Karl Hansl,
XVI. Wien 75, I Stg. II./16
Thaliastrato
Aŭstrio.
Österreich,

ESPERANTO
INTERNACIA LINGVO




ESPERANTO

1936 Manĉestro




1934 Valencia

1935 Parizo







1938 Bruselo

# NI PRI NI

Bonvenon al novaj klubaj geamikoj

Roberson Mauricio Caldiera Nunes
Rua Freia Fabiano de Cristo 305
Jardim das Americas

BR-81 530 Curitiba PA



D-ino Betty Cadavid
Apartado 055 077

Bogota D.C. 2

Kolombio



# INTERŜANĜO SERĈATA

Nia kluba amiko Biesiada deziras ŝanĝi!

Li proponas: AU 1 * DG 1, 2 * HI 2 * JU 1 * NE 1 * SVE 3 *, aŭstra TUT kun E-pm kaj serĉas: IT 1 * FRA 1 * HI 1 *, TUT, neuzitaj de SU kaj FL. Li ankaŭ aĉetus la mankantajn.
St. Biesiada, skr. poczt. 599, PL-42-217 Częstochowa 17.

# OPINIOJ

Estis Jankowski, kiu reagis al mia demando pri poŝtĝirokostoj:
"...ĝis antaŭ 2-3 jaroj ĝiro al eksterlanda konto estis senpaga. Poste oni enkondukis pagon de DM 3,-- kaj depost somero la depreno por ĝiroj ĝis DM 500,--: DM 10,--! Kion diras nia kasisto kaj kian solvon li proponas? Mi ne ŝatas, ke ni estas kvazaŭ bovinoj, kiujn oni laŭplaĉe melkas.
Propono de Hirsch: En ĉiu lando, kie estas ELF-AREK'anoj, unu el ili devus esti preta, enkasigi unufoje dum la jaro la kotizojn de la membroj en la koncerna lando. Tiamaniere oni povas ŝpari la kostojn de la unupoaj membroj kaj havas nur 1-foje aŭ eble 2-foje la kostojn.

# DANKON



Mi kore dankas pro ricevitaj kontribuaĵoj al gesinjoroj:
A.G. Strönne, Song, Cao, Ba-Jing-Ke, Emilio Folgado Lopez, Amouroux, Piton, Jankowski, Hirsch. Sincere mi salutas vin ĉiujn

Via redaktoro Rudolf Burmeister

# NI EN EKSPOZICIOJ

Modele agas nia kluba amiko James Rezende Piton en Brazilo. El lia letero (al Paulsson) mi ĉerpas la jenajn interesajn faktojn:
"...Post BRAPEX VIII aperis pri la ekspozaĵo aparta mencio en la filatela-bulteno de Asocio Pritema Filatelio. Mia kolekto nun estas en la tutamerika ekspo EXFILBO 90 en LA PAZ/Bolivio kaj 20-28an de marto 1992 en brazila/argentina ekspo ARBRAFEX 92 en Porto Alegre/BR. La 9-17an de majo 92 en la portugala/brazila LUBRAFEX en Lisbono. Krome ĝi trovos lokon julie en 28-a brazila E-kongreso, aŭguste en la ĉefpoŝtejo de mia urbo... Mi estas tre kontenta pri ELF-AREK kaj decidis energie popularigi Esperanton helpe de la E-a filatelio. Mi aktivas en nia loka E-klubo... kaj cetere mi




La brazlia filatela ekspo BRAPEX jam depost jaroj estas famkonata. Maldekstre vi vidas E-koverton de BRAPEX 1938 kun ĉiuj specialaj stampoj, ankaú la E-stampon.

Krome la brazilan E-pm, eldonita 1937 okaze de la 50-a Jubileo de Esperanto.

devas studi en tiu ĉi lasta universitata jaro...Laú niaj eblecoj ni devas "semi kaj semi kaj neniam laciĝi..."
Tiom el tiu interesa letero. Ni direktas korajn salutojn kaj gratulojn al nia Piton. Havu sukceson lastan studjaron. Skribu pri akiritaj medaloj, eble kun iuj eĉ ne-E-aj-stampoj, aú via foto! Al la redaktoro!

En Ĉinio

La ĉinaj E-filatelistoj Cui Haijing kaj Zhou Zhiqi montris siajn E-filatelajn kolektojn en la 1991-a jara Ĉina Ekspozicio de Laborista Filatelaĵoj , kiu okazis 26.8. - 1.9. 1991 en Lanzhou sub la aúspicio de la Ĉina Ĝenerala Laborista Sindikato. Ni gratulas al niaj ĉinaj E-filatelaj amikoj pro akiro de arĝenta kaj arĝentumita medaloj! Tiun ĉi informon mi trovis en EPC 2/1992, kiun disponigis al mi nia Ĉin Kajĝi!

Tiu koverto datas de 1984, eldonita okaze de la tiama fila-ekspo en Lanzhou. La E-sta estas ne-ofiala.



# NOVAJ STAMPOJ

Pri ĉinaj stampoj

Denove necesas enkondukaj vortoj . Jam estis preta mia manuskripto, sed hodiaú (1a de aprilo) atingis min letero de nia amiko Song Shengtan (koran saluton kaj koran dankon al vi!) kun sciigoj pri ĝisdate nekonataj stampoj. Feliĉe kun bonaj fotokopioj. Kompreneble ne plu eblas ilin kronologie envicigi, sed mi ilin notas laú nia "LVL-ordo". Kronologian vicon ili ricevos post certa tempo en la suplemento(j) por nia stampo-katalogo.

Cetere mirigas min, ke la pluraj E-filateliaj Ligoj en Ĉinio ne serĉas kontakton al nia LVL por raporti pri ilia agado. Nia LVL ŝajne estas la unusola filatela informilo en la mondo, kiu tiom detale klopodas informi pri la ĉina E-filatelio. Almenaú necesus, ke tiuj ĉinaj E-filatelaj kluboj kreus por si komunan tegmenton por kolekti gravajn notojn pri ilia agado. Se ne, granda parto da faktoj perdiĝus! Kaj nun al la novaj ekscioj:

TJ 1991-58: E-kgr en Tangshan (oficiala!)




30. 12. 1991: Tangshan, Provinco Hebei. Teksto: LA 2-A ĈINA KONGRESO DE ESPERANTO. Uzita ĉe Tangshan pm-kompanio. (Song-info)

TJ 1991-59: E-movado en Changshu




22.5. 1991, Changshu, Provinco Jiangsu. Teksto: LA 80-JAROJ DE EM EN CHANGSHU. La stampo estas poŝta, uzita de la ĉefpoŝtejo de Changshu.

La informo de EPC kaj La Mondo estas eraraj. (Info de Song, desegnis: ZLR)

TJ 1991-60: Princo Teng Pokalo, Nanchang

1991. 6. 20-30: Nanchang. Teksto: ELSTARAJ KALIGRAFAJOJ SELEKTITAJ EN LA PRINCO-TENG-POKALA`TUTLANDA INFANA KONKURSO kaj LA EKSPOZICIO DE. Land-kaj urbo nomoj notita en E: ĈINIO kaj NANGCHANG. Uzita de Nanchang-a pm kompanio sur dekorkoverto JF 008 kun dorsflankaj klarigoj en la ĉina: Eldonkvanto: 1000. Desegninto: "Esperantisto (kiu?). Informis: Cao Xionglin. Dankon! Kvankam tiu stampo krimas (pekas) kontraú pluraj punktoj de la stampa poŝtregularo en TJ, ĝi fontas el oficiala poŝta oficejo kaj sekve ni ĝin akceptas poŝta.
Rimarko de Hirsch: Mi nepre bezonas pli klaran legeblan bildon de la stampo por la katalogo. Kiu liveras ĝin?

Ĉina proverbo: (baiwen bu ru yijian)

Ĉina kaligrafaĵo 百闻不如一见

Unufoje vidi estas pli bone ol centfoje aúdi


330003

滕王閣杯全國少年兒童書法大獎賽優秀作品展覽




TJ 1991-60
Princo Teng Pokalo



1991年6月20日—30日·北京

330008

TJ 1991-61: Tao Xingzhi, Haikou

18.10.1991, Haikou, Provinco Hainan. Teksto: FAMA EDUKISTO kaj en la ĉina:La 100-a datreveno de la naskiĝo de Tao Xingzhi. (Vd. TJ 1991-52 en LVL 88) Desegnis: ZLR. La stampo estis uzata ĉe Haikou pm-kompanio. (Info de Song)




TJ 91-61




TJ 91-62




TJ 92-01

TJ-1991-62: Naskiĝo de Zamenhof, Haikou

15.12. 1991: Haikou, Provinco Hainan. Teksto: 132-a DATREVENO DE LA NASKIGO DE ZAMENHOF. Desegnis: ZLR. Uzita ĉe Haikou pm-kompanio. (Info de Song)

TJ 1992-01: E-filatelio en Haikou

1992.01 05: Haikou, Provinco Hainan. Teksto: LA UNUA JARO DE LA ESP: FIL-LIGO SUB HFL (HFL: Haikou Fila-Ligo). Desegnis: ZLR. Stampo uzita ĉe Haikou-pm-kompanio (Info de Song).

TJ-1992-02: Jaro de Simio en Ĉinio, Changji

1992 januaro 25 en Ĉinio aperis 20- kaj 50-fenaj pm-oj kun simboloj por tiu ĉi jaro. Ambaú "malfermis" la duan serion de ĉengciao-pm. ĈENGCIAO signifas "Lunkalendara jarsimbolo" kaj ni E-filatelistoj jam konas tutan vicon el ili. Al la ĈENGCIA -temo ankaú apartenas la ĉiujare aperintaj specialaj poŝtkartoj, unuatagaj kovertoj kaj senlima maro da poŝtstampoj. Inter ili kelkaj Esperantaj. BA-JING-KE, nia kluba amiko, sendis al mi leteron kun la informo: "...Hodiaú nia PT-oficejo emisias E-UTK kun E-a stampo..." Feliĉe sur la dorsoflanko de la UTK mi trovis informon, ke




temas pri koverto CJ 8 kun eldonkvanto de 2000 pecoj. Seslinia E-teksto informas, ke temas pri UTK por Lunkalendara jarsimbolo pm. Desegninto: Zhang Jing-wen. Sigelilo: "En nova jaro estos nova progreso". La ruĝa stampo kun la dato: 1992-1-25 posedas la tekston: FELICON - LA SIMIA JARO kaj montras en cirklo sidantan simion. Aperas ankaŭ arabsimilaj skribsignoj en la sta. La stampo estas uzita de la PT-oficejo Ĉangji, situanta apud Urumchi en la ekstrema nordokcidento de Ĉinio. Urumchi estas la ĉefurbo de la Ĉina Aŭtonoma Regiono Sinĝjang-a Ujgura.

La arabsimilaj skribsignoj estas la turkmena lingvo (detalojn vi trovos en ĉiu leksikono).

GĐR 39-1 ne ekzistas!

La sta kun falsaj vivodatoj de L. Renn ne ekzistas. Antaŭ uzo de la stampilo,oni rimarkis, ke Renn ne atingis aĝon de 150-jaroj kaj forigis la vivodatojn el la stampilo. Ekzistas sole fotokopio pri la originala aspekto de la stampilo.
Cetere neniu el nia klubo reagis al la falsa informo. Streku, do, el la katalogo la pozicion: GDR 39-1. Validaj estas la notoj sub 39-2, nun "39".

51-a hispana E-kongreso (la kompleta materialo)

Nia estimata amiko Emilio Folgado Lopez (Badajoz-E) sendis fine de februaro informojn pri la kompleta filatela materialo de la 51-a hispana E-kgr, okazinta en La Laguna /Tenerifo, 14-19 julio 1991.Tial tiom malfrue, ĉar ankaŭ li nur komence de februaro 92 ricevis ĝin de la firmao ALFIL, kie li havas abonon. Jen do la informoj:
Poŝta stampo: dato 14-19 julio 1991, loko: La Laguna- Tenerife.
Teksto: 51-a HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO. En la mezo de la

stampo elementoj el la kongresa afiŝo (?) kun turo kaj insigno. Preskaŭ identan kopion ni trovas sur la:

KONGRESA KOVERTO

Tiun ĉi aperigis la LKK kaj ĝi bele montras la kongreson stampon. LKK aperigis duan kongresan koverton kun kopio de la kongresa afiŝo. Trian kongresan koverton aperigis la filatela firmao ALFIL, kiu jam dum jardekoj eldonis ankaŭ por aliaj E-kongresoj




belajn filatelajn memorajojn. Tiu ĉi koverto prezentas per klara desegnajo tiun turon, kiu aperas en la kongresa afiŝo.

KONGRESA KARTO:

Al la oficialaj kongresaj eldonajoj apartenas (kiel ĉiujare) denove kongresa bildkarto kun la kongresaj simboloj.

SENFINA MAŜINVARBSTAMPO:

Ja ni raportis pri tio en nia antaŭa LVL. Tamen jen la informo de nia Lopez por vi, ke oni uzis la stampilon dum unu monato. Li aldonis, du sms kun la datoj: 14.6. kaj 11.7. 91.
Koran dankon al nia amiko Lopez pro la informoj!

Kio pri RO 4 ?

Nenia reago je miaj demandoj pri tiu stampo, kiu, stampita en la rumana urbo Timisioara, dum la 27a de julio 1991, samtage haveblis en la norvega Bergeno...afero ne ebla (??).Mi forte pridubas ĝian poŝtecon, ĉar ĝis nun ĝi nur fontis el la komerco. Bedaŭrinde la komercistoj ĝis nun ne diris ion pri la sendinto. Kiu el vi posedas originale senditan?


Pri la stampo SU 1 (datoj kaj koloroj)

Bedaŭrinde iujn nuntempajn stampojn ni tre supraje pritraktas, kelkfoje pro nekompletaj aŭ eĉ falsaj informoj flanke de la sendintoj. Pri niaj malnovaj stampoj ni tamen tre skrupule okupiĝas. Ilin ni vere "lupee" rigardas. Ekz. nia Hirsch tra pluraj jaroj akiris multajn GER 1 stampojn kaj faris komparojn inter ili. Mi vidis en 1965 la unuan SU 1 stampon kaj 1967 mi komencis kompili nian unuan ilustritan stampo-katalogon. Siatempe terure komplika

laboro, mane mi desegnis laú iuj pli aú malpli bonaj originaloj aú fotoj. Tiel naskiĝis kompreneble tuta vico da eraraj bildoj, ankaú pri SU 1 (Fenikso 38) kun "LENINGRAD" kaj sen "SAT". En la lastaj 2-3 jaroj nia Fekete, Hirsch kaj Amouroux atentiĝis pri la erara stabildo kaj skribis pri tio al mi. Feliĉe ili aldonis kopiojn kaj mi povis akiri 3 SU-stampojn el aúkcioj. Hodiaú ni scias, ke SU 1 funkciis jam de 2.-5.8. okaze de la 3-a Sovetunia E-kongreso, tuj antaú la SAT-kongreso, en nigra koloro. Partoprenis tiun verŝajne ĉiuj SAT-kongresanoj, kiuj alvenis ŝipe el Hamburgo. 6.-11.8. la sta aperis en la verda, okaze de la SAT-kongreso. Tamen, jen esceptoj:




D-ro Siegfried Ziegler estis post la 2-a mondmilito la unua prezidanto de la Germana E-Asocio





Cu eble temas pri la subskribo de la patro de nia Prof. d-ro Ivo Lapenna?

Hirsch trovis bluan stampon, dato 7.8., en aúkcio. Mi posedas stampon en ve kun dato: 1.8.. Nepre temas pri poŝta eraro, ĉar el la du akompanaj normalaj poŝtaj datstampoj de 11. kaj 12.8. eblas konkludi, ke tiu 1.8. stampo estas de la 11.8.. Bonvolu rigardi viajn SU-1 stampojn laú datoj kaj koloroj kaj skribu pri viaj ekscioj al mi, Burmeister.

Kaj lige kun SU-1:

Kompilante filatelan ekspozaĵon lige kun la sta SU-1 vi povas utiligi ankaú bildpoŝtkartojn pri la Taúrida Palaco; ĝi estis la kongresejo. Krome poŝtmarkoj kaj tutaĵoj pri Lunaĉarski, Ministro pri Klerigado, li estis la Alta Protektanto de tiu kongreso kaj faris pozitivajn eldirojn pri E.! Ie mi legis, ke eĉ ekzistas telegramformularoj en E.

Sur la venonta paĝo ni montras al vi "maksimum-poŝtkarton (??)" de la pm de la SAT-kongreso 1926 kaj TUT-koverton kun aldona poŝtmarko pri Lunaĉarski kaj eltondaĵon el TUT-kov. de la Taúrida Palaco.










## *Lastminute:*




atingis min, sendita de nia Jean Amourou, mašinvarbstampo por la 47-a SAT-AMIKARO-kongreso en BORDEAUX-BASTIDE kun la dato: 24-3-1992.

Dankon kaj salutojn al vi!

Rimarko de Hirsch:
Bedaúrinde la poštoficejo en Bordeaux ne singarde stampis ĉiujn kovertojn. Mi aldonas fotokopion de miaj stampoj, kiujn mi ricevis pere de abono!

# TUTAĴOJ

## Cu nova TUT el Ĉinio?

Atingis min du simiojaraj pk-tutaĵoj. Dorsflanke troviĝas du desegnaĵoj. Inter tiuj:kuranta leterportisto. Tiu havas sur la brusto kvinpintan stelon kun granda "E" (??) en ĝi. (Rimarko de Hirsch: Per lupeo estas fakte videbla ruĝa grandlitera "E". Ĉu nia stelo intertempe ruĝiĝis ?)Por tion ekkoni, oni bezonas lupeon. Mi nun ne scias, ĉu la grafikisto uzis la E-simbolon? Neniu el niaj multaj ĉinaj klubaj geamikoj sciiĝis pri tio, aú faris rimarkon. Cetere tiuj pk`oj posedas ankaú lanternan stampon, kies signifo ne estas konata kaj surpresitajn numerojn. Ĉu temas pri iu loterio?

## 20-a datreveno de ĈEA

Neniu pri ĝi informis, tamen min nun atingis surpresita 50-halera pk kun la surpreso: FESTOTAGOJ OMAĜE AL 20-A DATREVENO DE ĈEA 1969-1989 HAVIŘOV. Certe privata surpresaĵo, sed ja ankaú tiujn ni registras. Kiu povas diri ion pri tio? Eble nia amiko Vana? Saluton al vi kaj familio.

# REKO-ETIKEDOJ

Eċ en la bonege organizita germana filatelio okazas surprizoj:
Nun nia Hirsch sendis kopion pri registrita letero el la Germana E-kgr München 1948 (16.5.48), kiu posedas, apud la 3-faka E-stampo, ankaú reko-slipon kun surstampita teksto: "MÜNCHEN 2, Esperanto-Kongress". Tute hazarde tiu reko-slipo havas la numeron 001. La tuta koverto estas tre bele filatele farita, kio min persone faras skeptika, des pli, ĉar ĝis nun neniu germana E-filatelisto aú Esperantisto vidis ĝin. Se ne temas pri iu trompaĵo, bone. Sed aĉeti ĝin verŝajne neniu kapablas (aúkcia prezo DM 350,--). Tro alta estis la postulita prezo.
Lastminute mi eksciis, ke ankaú nia amiko Heimlich vidis ie tiun reko-slipon. Ĉar ankoraú mankas detaloj, mi raportos en la venonta LVL.




# NUMISMATIKO

En LVL 86, p.16, ni informis pri E-a kreditbileto. Nun nia Jankowski aldone informis, ke oni vendis ĝin en la aúkcio kontraú DM 520,-- (proksimume 325,-- US$). Aĉetinto estis supozeble monkolektanto el la urbo Düsseldorf. Dankon kaj koran saluton al vi!

# TELEGRAMOJ EN LA FILATELIO



Tre malofte oni renkontas telegramon en fila-ekspozaĵoj. En mia ekspozaĵo pri Esperanto jam de komenco troviĝas tia, en E-o. Temas pri gratula telegramo en E-o de la E-klubo Varsovio al tiu en Karl-Marx-Stadt (hodiaú: Chemnitz), iama GDR, el la jaro 1965. Kun ĝi mi ligis la noton, ke la Universala Telegrafa Unio sekvis dum sia tutmonda konferenco 1925 en Parizo la rekomendon de la Ligo de Nacioj (20. sept. 1924), akcepti Esperanton kiel klara lingvo por la telegrafado.
Jam en 1892/93 en Ruslando eblis senĝene ekspedi telegramojn.

TELEGRAMM

DEUTSCHE POST

Aufgenommen
Tag: Monat: Jahr: Zeit:
-2. IX 65 19 64

ELT = DEUTSCHER KULTURBUND
ESPERANTOSEKCIO KARL-MARX-STADT =
Dr. Otto Nuschke Str 6

Übermittelt:
Tag: Zeit:
an: durch:

2U111A WARS PL

141Z KMST DD13
Karl-Marx-Stadt

Ausland

Telegramm aus 84 WARSZAWA/1 115/2 20 2 1737 =

MULTAJN TUT KORAJN KAJ SINCERAJN BONDEZIROJN POR SUKCESPLENA
AGADO POR LA PACO SENDAS = ESPERANTOGRUPO WARSZAWA +

ELT + 141Z KMST DD1815

Für dienstliche Rückfragen

C 187

30.12.04 la rusa pošta administracio oficiale donis la permeson, sendi enlande kaj eksterlanden E-lingvajn telegramojn, je la kondiĉo prezenti samtempe nacilingvan tradukon (EdE, p.456). 2 jarojn pli poste la Ministro de la Publikaj Laboroj de Brazilo, d-ro Lauro Müller, laŭ la "Boletin telegrafica" de 30 no. 1906, deklaris E-n kiel "klara lingvo" por la telegrafado en Brazilo (EdE p.63). Kompreneble ĉi-loke EdE eraras, se ĝi asertas, ke Brazilo unua faris tian decidon, ĉar 400 paĝojn pli poste legeblas la notoj pri Ruslando.

# ESPERANTISTOJ SUR PM

## NOBELPREMIITO ALVA MYRDDAL ESPERANTISTINO




En la sveda E-gazeto "LA ESPERO" 1/1988 troviĝas artikoleto pri la svedino Alva Myrdal. En la jaro 1982 ŝi ricevis la Nobelpremion de Paco. 1991 la sveda pošto emisiis pm-serion pri Nobelpremiitoj de Paco. En ĝi ankaŭ 4-krona pm pri Myrdal.
En la artikoleto legeblas, ke ŝi, kiel juna knabino, lernis Esperanton. Tion skribis la filino de Myrdal, Sissela Bok, en sia libro: "Alva - ett kvinoliv".

...Dankon al nia Anna-Greta Strönne, kiu sendis tiun informon.

# GLUMARKOJ

## Internacia Helpa Mono

En LVL 83, p. 14, vi trovas informojn pri spesmilaj glumarkoj. Nun Hans Jankowski en Portugalio vidis ĉe Esperantisto glumarkojn el la jaro 1907 "INTERNACIA HELPA MONO - 2 SPESDEKOJ 5 CENTIMOJ"

Ili ja ankaú estas notitaj en la nov-eldono de la Jensen-Katalogo, n-ro 9. Kio estas nova por ni, tio estas ekzisto de variajoj kun la surpreso "UEA" kaj ekzisto de nedentumitaj (flavaj) ekzempleroj. Min ĝenas la surpreso "UEA", ĉar UEA fondiĝis nur en 1908, ne en 1907. Supozeble UEA transprenis tiujn glumarkojn de la ESPERANTA ĈEKBANKO.







En unu el la venontaj LVL ni ankoraú pli detale okupiĝos pri tiu ĉi temo. Ankaú ekzistis tiel nomataj "korespondmarkoj" kun "spesmiloj".

G L U M A R K O J : ofte valoraj dokumentoj!

Sendube la emo, voli kolekti E-glumarkojn, ege suferis sub la "el--donpolitiko" de iuj eldonistoj. Kiam oni devas iom pli severe enprofundiĝi en tiun temon, montriĝas vere strangaj fenomenoj, kiuj koncernas ĉiuspecajn variaĵojn. Tamen delonge mi intencis prezenti iujn, laú mi, valorajn E-glumarkojn. Pasintjare mi havis okazon, persone vidi la imponajn glm-kolektojn de niaj Anna-Greta Strönne kaj Richard Hirsch. Hodiaú nun mi montras la glumarkojn de la antaúmilitaj SAT-kongresoj (vd. titolpaĝon). Ili ĉiuj estas raraĵoj. En lakolektoj mankis tiuj el la 1937-a jaro de la SAT-kgr en Rotterdam (NL). Notojn pri ĝi mi trovis en la Jensen-katalogo kaj en la re-eldono de nia ELF-AREK. Eble iu inter vi sendas kopion pri ĝi al la redaktoro? Interesas min, ĉu mi ankaú estonte montru al vi malnovajn glm-ojn pri UEA-, IFEF- aú naciaj kongresoj.Sube troviĝas listo pri aperintaj glumarkoj por SAT-kongresoj. Ne notitaj estas variaĵoj:

| | | |
|---|---|---|
| 1928 - 8-a Göteborg | 1949 - 22-a Parizo | 1961 - 34-a Gent |
| 1929 - 9-a Leipzig | 1950 - 23-a Torino | 1962 - 35-a Vieno |
| 1933 -13-a Stokholmo | 1951 - 24-a Stokholmo | 1963 - 36-a Hamburg |
| 1934 -14-a Valencia | 1952 - 25-a Düsseldorf | 1964 - 37-a Narbonne |
| 1935 -15-a Parizo | 1954 - 27-a Nacio | 1965 - 38-a Karlsruhe |
| 1936 -16-a Manĉestro | 1955 - 28-a Linz | 1966 - 39-a Swanwick |
| 1937 -17-a Rotterdam | 1956 - 29-a Beograd | 1967 - 40-a Malmö |
| 1938 -18-a Bruselo | 1957 - 30-a Rotterdam | 1968 - 41-a Utrecht |
| 1939 -19-a Kopenhago | 1958 - 31-a Helsinki | 1969 - 42-a Novi Sad |
| 1947 -20-a Aarhus | 1959 - 32-a Dortmund | 1970 - 43-a Augsburg |
| 1948 -21-a Amsterdam | 1960 - 33-a Aarhus | |

Nova glumarko 1992




Trovita sur letero sendita de Amouroux.


47-a kongreso de SAT-AMIKARO en Bordeaux, 17-21 apr 92. Bildo: kreskaĵoj kaj stelo. Verda sur helverda

Detalaj informoj mankas ĝis nun.

# REVOJ KAJ SONĜOJ PRI ESPERANTUJOJ (dua parto)

Propaganda Ligo
Parkurbo
Esperanto
GRÄFELFING-
- MÜNCHEN -
(Germanujo)
8 Pfandhausstrasse 8.

Bankakontoj:
:: Ĉekbanko Esperantista ::
Bayer. Vereinsbank München.



Parkurbo Esperanto apud München. — La konstruota Kazino.

Karaj geiratoj,
antaŭen sen timo!
Gardu kuraĝon
en via animo!
Nia smeralda
standardo kun stelo
Nin alkondukos
sendube al celo!


"Parkurbo Esperanto"

"Alia plano ĝermis en la kapo de homoj, kies espero je monprofito certe superis ilian idealisman flankon: La 8-an de junio 1912 sub la impulso de la Dresden-a komercisto Leopold Schlaf, fondiĝis la Propaganda Ligo "PARKURBO ESPERANTO" sub la adreso: München, Pfandhausstr.8. Ties celo estis, krei esperantistan urbon, helpe de munkena bankisto, laŭdire favoranta Esperanton. La Ligo akiris en la vilaĝo Gräfelfing terenon de miliono da kvadrataj metroj.

La Ligo havis estraron, kies plej aktiva ano estis s-ro Schlaf. Tiu jam eldonis lernolibron, vortaron kaj E-bildkartojn . Li eĉ fondis en Germanujo "Laboristan E-Ligon".

Por financi la entreprenon, la Ligo organizis loterion, kiu konsistis el miliono da biletoj de po 1,-- marko. La germana leĝo permesis loterion nur inter membroj de sama societo kaj tial necesis deviga aliĝo, cetere senpaga. La E-gazetaro siatempe ne multe bruis pri tiu entrepreno, sed rimarkebla estis vekita scivolemo de la tutmondaj Esperantistoj. Sed baldaŭ leviĝis demandoj pri la seriozeco kaj efikeco por Esperanto de la tuta afero. En decembro 1913 la ruso Obruĉev tiele finskribis raporton pri vojaĝo tra Germanujo: "...Sinjoroj, fondu parkurbojn, nomu ilin "Esperanto", organizu eĉ loteriojn, sed ne postulu aliĝon je la nomo de "nia sankta afero", ne parolu pri la "estonta ĉefurbo de nia karega Esperantujo, ne malklarigu nian simplan celon per nebula revado...". En junio 1914 la ruso Devjatnin, ekssekretario de tiu ligo, atentigis: "...Ni avertas, ke oni ne sendu monon al la projektita parkurbo... la afero ne estas fidinda..."."

Jen, do, mallongigita artikolo el "Kulturaj Kajeroj" el la plumo de nia Amouroux. Jam delonge min interesis tiu mistera "Parkurbo Esperanto". Ja mi renkontis iujn spurojn pri ĝi: glumarkojn, varbfoliojn k.a. Antaŭ jaroj la filatelista ĉefo de mia urbo donacis al mi eĉ originale senditan parkurban koverton, en kiu estis sendita "membrokarto". Dankon al nia Amouroux pro la transdonitaj informoj!













La koverto de la "Parkurbo Esperanto"
kun la stampindiko: membrokarto enmetita.

## "E S P E R A N T O  K O L O N I O en Germanujo




Inter multaj esperantaĵoj, kiujn mi lastatempe ricevis, ankaŭ troviĝis la dekstra koverto. Temas pri libertempa hejmo por Esperantistoj en Driedorf, kelkaj km norde de Limburg.

Ĝis nun mankas detalaj informoj. La stampo estas el la jaro 1947. Kiu el la ELF-AREK'anoj eble scias detalojn pri tiu objekto? Bv., se vi ion scias, skribu al: Richard Hirsch, adreso vd. sur la paĝo 16.

Tiu dokumento denove pruvas, ke,se oni severe kaj serioze serĉas, oni ĉiam povas trovi ion, kion pliriĉigas la historion de Esperanto.

Nia katalogisto Hirsch plendas:

"...Kiam 1990 aperis nia granda katalogo, mi povis vendi multajn, eble iom pli ol 80 ekzemplerojn. Aŭtomate mi sendis al ĉiuj katalog-posedantoj la unuan suplementon. Bedaŭrinde nur malmultaj pagis ĝin. Por la 2-a suplemento, ofertita en nia LVL, venis nur malmultaj mendoj. Nun aperis la tria suplemento, sed denove venis nur unuopaj mendoj. La pagoj por ili intertempe eniris,

Jen, do la demando: ĉu ni daŭrigu la aperigon de ĉiujara suplemento?? Respondon sendu al mi aŭ al la redaktoro..."

Hirsch nun proponas jene: Estonte ni nur eldonu suplementon post du-tri jaroj. La novaĵojn ĉiu ja povas ĉerpi el la LVL.

Nova adresaro de ELF-AREK

Aldone vi trovas en tiu LVL poŝtkarton, kiun vi bv. resendu plenigite al la indikita adreso. Ankoraŭ aldonajn petojn: bv. indiku ankoraŭ ie, kion vi kolektas. Krome la kolektamikoj en landoj, kie ne estas uzata la latina alfabeto , bv.algluu sur la poŝtkarto, eble sur la antaŭa flanko, maldekstre, sur mia letereto vian adreson en via alfabeto. Mi jam ofte konstatas, ke tio estas granda helpo por la tieaj poŝtistoj. Dankon!!

# AFRANKSTAMPOJ

Pri la AF de CSFR:

Nia klubamiko Hasala respondis al niaj demandoj:

"...La AF de Stražnice kun kadreto, oni nur uzis: 06 12 91. Estas mia propraĵo. (Restas la demando, ĉu kun konsento de la poŝto?) La AF kun la dato: 09 08 91 nur estas provstampo, bezonata por la petskribo al la distrikta poŝta centro pri konsento de uzado. AF kun datoj de 9.8.91 ekzistas nur en nul-valoro, do filatele senvaloraj.

-Tekstopartojn (tp) de AF mi estonte ne plu pruntedonas aliloken. Temis pri erara agado. Mi celis pli grandan propagandefikon..."

Informilo de ELF-AREK
Esperanto-Ligo Filatelista
Amika Rondo de Esperantaĵ-Kolektantoj
*Offizielles Organ der ArGe Esperanto i. BdPh e.V.*

*Redakcio ĉe:* *Rudolf Burmeister, Max-Müller-Str.62 D-O-9052- Chemnitz*
*Prezidanto:* *Ivar Paulsson, Skytteholmsvägen 29 S-17144 Solna*
*Kasisto:* *Rolf Beau, Jacobstr. 9 D-O-7010 Leipzig*
*Poŝtĝirokonto:*
*Poŝtgiro-Oficejo: Nürnberg (bankkodo (BLZ):760 100 85)*
*Konto.-No.: 3667 37-855 (adreso de Beau)*
*Kotizoj por 1992: DM 21,--/15 IRK/12 US$*
*Stampobanko:* *Werner Heimlich, Fröbelstr. 4 D-W-3040 Soltau*
*Kompostis+ ekspedis* *Richard Hirsch, Lambertstr. 12 D-6430 Bad Hersfeld*
*Presado:* *Albert Oesterle, Hubertusstr. 28 D-W-8853 Wemding*



**599. — Jam de tri tagoj mi lernas Esperanton, kaj ankoraŭ nenia fremdulo promesis al mi edziĝon!**
**(Jen, Barcelona, 1910. nro 9.)**